

Scienc-teknika kampanjo

Jen la plano al kiu ISAE kaj la fakaj societoj povas dediĉi la ĉefan aktivecon kaj ĉirkaŭ ĝi mobilizi kaj unuecigi ankaŭ multegajn nun neaktivajn fakulojn-esperantistojn. Jen *konkreta kaj utila laboro* por ĉiuj iliaj membroj (kaj por la novaj membroj). Sed komence tiun laboron devas helpi la tuta movado. Simile al la lerneja kampanjo, ni devas starigi la scienc-teknikan kampanjon. Sed ĝi estos *vera kampanjo*, ĉar ĝi ne devos longe daŭri — nur ĝis la sufiĉa konatiĝo de interesigantaj industriaj kaj alispecaj esploraj institucioj kun la servoj kinjn la internacia lingvo (kun la organizita aktiveco de fakuloj-esperantistoj) povas doni al ili. Post tio la afero marŝos sen ekstra helpo, kun la fortoj de la fakaj societoj mem kaj kun la nepre starigota oficejo de ISAE (se ISAE transprenos la taskon).

Kiam la Centro plifortiĝos, t. e. kiam ĝi havos grandan laboron kaj grandajn spezojn, tiam ĝi kreos siajn fakajn sekciojn, intime ligitajn kun la fakaj societoj. Certe de tio ankaŭ la fakaj societoj povos havi nur utilon.

001.4:42

PRI LA INTEREGALIGO DE LA FAKLINGVOJ

Ekzistas kialo pro kiu necesas admoni tradukistojn de fakliteraturo kaj verkistojn de fakvortaroj, ĉiam eliri el la nocio kaj difino, kaj ne senpripense transpreni al Esperanto terminon de iu ajn naci-lingvo. Ekz-e esperantista kolego tradukinte maŝinfakan anglalingvan vortliston transprenis multajn anglajn radikojn, malgraŭ ili estas plursencaj (homonimaj), aŭ tiajn vortojn kiuj en la franca aŭ germana havas tute alian signifon. Kiam T. C. entreprenis Esperanten traduki la deklingvan terminaron »Vocabulary of basic terms used in LINE TRANSMISSION« elverkitan de **International Telegraph and Telephone Consultative Committee (CCITT)** kaj publikigitan en 1959 de **International Telecommunication Union (ITU)**, ni devis konstati ke en tiu terminaro mankas difinoj por la unuopaj terminoj, kaj ke pro tio ne sukcesis al tiu komitato atingi ĉe kelkaj artikoloj plenan koincidon inter la signifo de la angla vorto kaj la respektiva traduko en la francan aŭ la germanan lingvojn. En tiu terminaro ekz-e la nocio kiun esprimas la anglaj vortoj »rack« kaj »bay of a rack« ne kongruas kun la apude indikitaj francaj kaj germanaj vortoj (Fr: baie, travée, bâti; De: Gestell, Gestellreihe, Bucht).

Same oni ofte trovas en artikoloj de la ĉiutaga gazetaro aŭ en radiodisaŭdigaj raportoj fakvortojn kiujn la tradukinto prenis laŭvorte el la angla lingvo. Ekz-e la angla verbo »to control« plej ofte ne estas simple tradukebla per »kontroli«, sed per »regi aŭ reguli, regulante observi, limigi«, ekz-e parolante pri naskiĝoj, ne taŭgas »kontroli«, sed oni devas diri »regi (aŭ limigi) naskiĝojn«, ĉar laŭ la Fundamento la verbo »kontroli« signifas aliaĵon, nome 1^e administracie ekzameni ion, por scii ĉu tio estas ekzakte aŭ laŭregule farita, 2^e detale esplori ion por scii ĉu tio estas konvene farita. — En tiaj dubaj okazoj la tradukanto laŭeble ĉiam konsultu internacian difinvortan de UNESKO, aŭ komparu la sencon kun alilingvanoj.

Laŭ la terminologiaj principoj indikitaj en **Rekomendo de ISO** (kp. la germanan normon DIN 2330) oni ĉiam devas eliri el la difino, ne el la termino.

R. Haferkorn